Ирина Саверьевна Алексеева ,

Odo al Samarkando

tradukita de Vladimir Masalkin

Mi kantas vin, ho, Samarkand'
Kaj laŭdas mi aspekton sunan!
Kaj vian koron — Registan' —
Mi ĉiam pretas nomi juna.

Korbaton ĝian sub stelar'
Eksentis Ulughbek junece.
Kaj daŭras de Timur centjar'
Kaj pli ĝi longas majestece!

Madrasoj sanktaj estas nun
La ejoj por la art' kaj sentoj.
Kaj de belec' ilia sun'
Centjarojn igis la momentoj.

La poezi' de Navoi,
Je amo kaj je forto riĉa,
Tre helpis al popol' de vi
Fiera resti kaj feliĉa.

De minaretoj kupolar'
Similas al stelar' ĉiela,
Beleco de la ornamar',
Lazuro pura kaj tre hela.

En saĝa urbo de l'anim'
Moske' najbaras kun preĝejo.
Por homoj, kiuj amas vin,
Vi estas bela rifuĝejo!

Ho, Samarkand', disfloru pli
Kaj gloru vin bonagoj fame!
Kaj flugu al eterno vi,
Restante apud ni ĉiame.

...

Ирина Саверьевна Алексеева ,

Ode to Samarkand

tradukita de Malcolm Jones

I sing of you, oh, Samarkand'!
Your wondrous features win my praises.
And your dear heart - the Registan -
seems young to me and never ages.

Its steady beating Ulughbek
could sense beneath the constellations.
Oh, Samarkand! Immortal pick
of mighty Tamerlan's creations.

Madrasses are your sacred schools,
which cultivate the arts and learning.
Their beauty overcomes time's rules
by centuries into moments turning.

Here the great Navoi's verse,
so full of love and strong emotion,
is cherished by your populace,
made happy by its inspiration.

The domes of minarets stand proud -
like day-time stars in clear sky shining:
so pure the blue, without a cloud
and fine the spires in art combining.

Oh, Samarkand! You're wise through age,
with mosques and churches closely neighboured.
For those who love you, the world's stage
has no town better nor more favoured.

Oh, Samarkand! Live long and thrive,
be glorified by each good action!
And while eternity's your prize,
be here our lasting benefaction.

...

Traduko de la Rusa poemo “Ода Самарканду” de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de Vladimir Masalkin.

Arg-860-1734 (2013-03-24 15:52:41)

Traduko de la Rusa poemo “Ода Самарканду” de Ирина Саверьевна Алексеева en la Anglan de Malcolm Jones.

Arg-860-2037 (2014-10-16 20:52:12)

Tiu ĉi poem-angligo aperis en 2013 en libro “Ода Самарканду” (= Odo por Samarkando). Sinjoro Malcolm Jones, kiu angligis la poemon, estas brita esperantisto. Lia adreso troviĝas en la UEA-jarlibro de la jaro 2014 sur paĝo 126.